

LA PROGRESO



OFICIALA ORGANO DE ČEĀOSLOVAKA ASOCIÒ ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.--; fremdlando Kĉ 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Pošta Sparkaso Praha: N-ro 34.271.

Z ESPERANTSKĀHO SVĒTA.

Dĉk Liechtensteinska ĉeskoslovenskĉm **esperantistĉm**. Alpskĉ kniŹectvĉ Liechtensteinskĉ v samĉm sousedstvĉ Svĉcar organisuje velkorysou propagandu svĉ zemĉ, aby upozornilo cizince na jeĉ krasĉ, jeŹ nejsou dosud dostateĉnĉ oceĉovĉny. Tamnĉ vlĉda pochopila vĉznam esperanta pro tuto prĉci a docilila tĉmto modernĉm prostředkem skvĉlĉch vĉsledkĉ, kterĉ nejsou v Źadnĉm pomĉru k nĉkladĉm zcela nepatrĉnĉm. Nynĉ jest vydĉvĉn a rozesĉlĉn do celĉho svĉta druhĉ esperantskĉ prvĉvodce touto zemĉ, jeĉjĹz oficielnĉ dopisnice majĉ pod obrazy rĉznĉch liechtensteinskĉch krajĉ esperantskĉ nĉpisy. — Upozornĉnĉ na toto novĉ oficielnĉ uŹitĉ mezinĉrodnĉho jazyka bylo rozŹĉřeno pomocĉ esperantskĉ organizace v ĉasopisech v 41 zemĉch, v ĉeskoslovensku se objevily ĉlĉnky o tom v 52 listech. Liechtensteinskĉ vlĉda ve Vaduzu podĉtkovala Svazu ĉeskoslovenskĉch esperantistĉ esperantskĉm dopisem za podporu jeĉch snah.

Esperanto radĉji neŹ anglĉĉtinu. V Estonsku se nynĉ mnoho uvaŹuje o tom, zda jest zĉhodno, aby Źkoly vĉnovaly i napřĉstĉ tolik ĉasu vyuĉovĉnĉ tak zvanĉch **svĉtovĉch jazykĉ**. Veřejnost zbouřilo prohlĉšení profesora university v Tartu (Dorpat), Źe Źĉci se Źho po jeho anglickĉch přednĉškĉch o vĉcech estonskĉch tĉzali, zda mluvil o Estonsku přĉznivĉ ĉi naopak. Veřejnĉ minĉnĉ jest velmi naklonĉno esperantu, jehoŹ dokonalĉ ovlĉdnĉnĉ neĉinĉ Estonĉm Źadnĉch obtĉŹĉ.

Přednĉšky o esperantskĉ literatuře v Londĉnĉ. Přednĉ anglickĉ Źstav toho druhu City Literary Institute v Londĉnĉ pořĉdĉ letos kurs o esperantskĉm pĉsmnictvĉ. Budou probĉrĉnĉ es-

perantŹstĉ spisovatelĉ od Zamenhofa do nejnovĉjŹĹ doby, ĉteny budou ukĉzky z vynikajĉch esperantskĉch dĉl a bude o nich debatovĉno. Esperantskĉ organizace přĉĉtĉ prĉvem nemalĉ vĉznam tĉmto přednĉškĉm, jeĉichŹ pořĉdnĉm dokĉzal Źstav, majĉci skoro 6000 ĉlenĉ, svĉ porozumnĉnĉ pro dĉleŹitost esperanta.

Esperanto v jĉzdnĉch řĉdech. Cifry vŹech jĉzdnĉch řĉdĉ jsou sice mezinĉrodnĉ, ale vŹichni vĉme, jak dĉleŹitĉ jest rozumĉti dobře tĉm rĉznĉm poznĉmkĉm. Ve Finsku jĉŹ pomohli tĉto vĉci. Aby se cizinci vyznali v jĉzdnĉch řĉdech, přĉdala tamnĉ Źelezniĉnĉ sprĉva vysvĉtlenĉ v esperantu, jeŹ jsou srozumitelnĉ snadno kaŹdĉmu.

Stĉtnĉ film esperantskĉ. Stĉtnĉ film o Dĉnsku, jenŹ byl v poslednĉ dobĉ promĉtĉn v ĉetnĉch mĉstech ĉeskoslovenskĉch, se potkal vŹude s neobyĉejnĉm Źspĉchem. Byla uspořĉdnĉ tĉŹ zvlĉŹtnĉ představenĉ pro Źkoly a mnoho tisícĉ Źactva spatřilo tento pouĉnĉ film. Z přĉkazu dĉnskĉ vlĉdy mĉ film esperantskĉ tituly srozumitelnĉ divĉku kterĉkoliv nĉrodnostĉ a projde tak snadno mnoho zemĉ. V Dĉnsku jsou velmi spokojeni touto Źĉelnou propagandou, jeŹ byla umoŹnĉna uŹitĉm esperanta.

Novĉ Zamenhofĉv pomnĉk. V lĉzeĉnskĉm mĉstĉ Reinerzu (DuŹnĉky) v Kladsku bude odhalen dne 15. srpna pomnĉk, jeĉŹ postavilo mĉsto na pamĉt nĉvŹtĉvy doktora Zamenhofa. Na dĉm, v nĉmŹ přebĉval autor esperanta v letech 1906 a 1909, bude upevnĉna bronzovĉ deska a nĉmĉstĉ s pomnĉkem Zamenhofovĉm bude nazvĉno Nĉmĉstĉ esperanta.

**EL LA LIBRO DE JAN WELZL:
„TRIDEK JAROJ EN LA ORA
NORDO“.*)**

(Paĝoj 67—70.)

Plej multaj orfosistoj, kiujn mi renkontis sur la rivero Anadir, devenis el Usono, el Los Angeles, el la suda Kalifornio. Inter la orfosado ĉi tie kaj sur Alasko, kiun mi ekkonis pli poste, estis granda diferenco. Unue la orfosistoj ne loĝis daŭre ĉi tie, ili restadis ĉi tie nur dumsomere kaj forveturis aŭtune. Ĉi tie sur la rusa flanko oni devis pagi dum la cara reĝimo tridek kopekojn por ĉiu profitita rublo. Dum mia vagado tra orkampoj, kiuj etendiĝis laŭlonge de ĉi tiu rivero, mi lasis rakonti al mi pri ĉio, kio koncernis la ĉi tiean orfosadon. Homo, kiu serĉas sian fortunon, devas demandi ĉie pri la vivmaniero. Estus ja eble, ke la fortuna ĝuste ĉi tie atendas lin. Tiel mi eksciis multajn aferojn, kiuj decidigis min ne resti ĉi tie. La fosistoj rakontis al mi, ke oni kompreneble tre priŝtelas la rusan registaron, ĉar ĝi ne kapablas sendadi siajn oficistojn tro ofte en ĉi tiujn forgesitajn regionojn. En aŭtuno ĉiuj fosistoj simple forkuris kun la tuta profito kaj neniu pagis la imposton. Tial decidis la registaro pli poste, ke kiu forlasos dum vintro la regionon, ne rajtas reveni al Anadir kaj ekposedi orkampon en la venonta printempo. Sed tiajn ruzeĝulojn, kiaj estis la fosistoj, la registaro kompreneble ne sukcesis superruzi. Ili faris tion same, kiel pli frue, nur ke ĉiam tri aŭ kvar kamaradoj kuniĝis, unu el ili ekposedis ne nur sian kampon, sed ankaŭ la kampojn aĉetitajn je mono de la kamaradoj, kaj ĉi tie li laboris por si kaj por ili, dum liaj kamaradoj serĉis la oron ie sur Alasko. Aŭtune la orfosisto forkuris, la printempon li kompreneble ne rajtis reveni, sed venis alia el la kvar kamaradoj. Post kvar jaroj, kiam denove estis la vico de la unua, ĉio estis jam delonge forgesita en la tieaj cir-

konstancoj, aŭ oni denove fosis en tute aliaj regionoj.

La laboro ne estis penega, la orfosistoj fosis nur sulkojn, en kiuj ili senpere ellavis oron.

De tempo al tempo venadis ĉi tien kozakoj kaj kontrolis ĉiujn, la orfosistoj devis prezenti siajn dokumentojn kaj la kontrolantaj oficistoj konvinkiĝis pri ilia profito. Kies dokumentoj ne estis en ordo aŭ kiu ne volis pagi imposton, ties oron ili simple konfiskis sen longaj ceremonioj.

La orfosistoj rakontis al mi, ke laŭlonge de la rivero Anadir kaj laŭlonge de la Sankta Laŭrenc-insulo forkuras ofte ankaŭ trans la glaciigintan maron politikaj arestitoj al Alasko en la urbon Nome. Multaj sukcesis, sed la plejparto pereis, ĉar trans la maron oni devas galopegi kvardek horojn kun bonaj boacoj por atingi la amerikan marbordon. Guste kiam mi migris de la Sankta Laŭrenc-insulo al Anadir, mi aŭdis pri du geamantoj, kiuj forkuris el la stacio de arestitoj kaj ie malaperis ĉi tie. Iu civilizita Ruso rakontis al mi dum longaj horoj pri teruraj suferoj, kiujn devis travivi tiaj forkurintoj. Sur la Sankta Laŭrenc-insulo estas granda eskima rezervajejo, kie la persekutatoj estas ĉiam afable akceptataj kaj gastigitaj. Li atentigis min, ke Eskimoj estas treege bonaj homoj, ke mi ricevos ĉion de ili kaj ke ili faros ĉion por mi, se mi kapablos almenaŭ iom interkompreniĝi kun ili. Ili havas ankaŭ bonan memor-kapablecon kaj de generacio al generacio ili rakontas al si, kio ĉio okazis en lastaj tempoj. Antaŭ kvardek aŭ kvindek jaroj estis sur la Sankta Laŭrenc-insulo eĉ malgranda kozaka stacio, kies tasko estis precipe atenti, ke kondamnitaj ne forkuradu tra tie al la oriento. Sed kiam estis malkovrita oro en Anadir, amasiĝis ĉi tie tiom da aventuruloj, ke ĉi tiu regiono tuj fariĝis tre danĝera. Oni rakontis, ke ofte la tuta kozaka garnizono estis murdita, ĉar kozakoj havis nutraĵon, kiu mankis al kelkaj orfosistoj, kaj aventurulo preferas ankaŭ alirilate, se en vasta ĉirkaŭaĵo ekzistas neniu reprezentanto de la justeco. Tial la stacio pli poste estis nuligita.

*) La libro estas jam finpresata kaj baldaŭ aperos ĉe Moraviaj Esperanto-Pioniroj. La mendojn jam akceptas la Progreso.

Nun dum la bolŝevika reĝimo estas en ĉi tiu regiono pli bone. Sur kelkaj insuloj estas radiostacioj kaj tiel intrigoj de diversaj krimuloj estis forigitaj. Ili konvinkiĝis baldaŭ, ke eĉ plej rapidaj boacoj ne sukcesas forkuri antaŭ rapida telegrafo kaj ke ĉiu forkuranta krimulo ĉiuflanke estas atendata de multaj viroj kaj multaj pafiloj.

La orfosistoj, kiuj kompreneble tre bone konis ĉi tiun angulon de Azio kaj la insulojn ĉe la norda bordo, priŝkribis la pluan vojon al mi tiel precize, ke sen timo mi ekmigris kiel eble plej frue returnen al la insulo Koljuĉin. Mi eksciis, ke mi povas migri pluen al okcidento de insuleto al insuleto, sed ĉiam proksime al la bordo, por ke mi povu vespere atingi ĝin kaj paŝtigi la boacojn sur tundro. Oni diris, al mi, ke mi faros tiel ĉiutage longan vojaĝon. Plej malproksimen okcidenten mi povos veni ĝis la Ursaj insuloj, sed ĝis la Novosiberiaj insuloj mi ne povos veturi, ĉar la veturo tien daŭras sur glacio multajn tagojn kaj tion la boacoj ne travivus.

Mi do ekmigris al Koljuĉin kaj de tie sur glacio laŭlonge de la bordo al okcidento. Ni flugis tagon post tago kvazaŭ vento. Ĉiam mi sukcesis trovi vespere tundron kaj paŝtigi la boacojn. Nur sur la lasta parto de la vojo de la Ajon-insulo al Ursaj insuloj mi ne atingis la celon antaŭ la vespero kaj preskaŭ morta pro angoro mi pelis la boacojn dum la tuta nokto kaj dum la sekvanta antaŭtagmezo, en freneza galopo ni flugis supren kaj malsupren sur la glacia ebena, iom sur la ventro, iom sur la postaĵo, kaj denove longajn horojn sen akcidento, en mia kapo zumis pro ekscito kaj mem mi ne kapablis manĝi. Sed tuj kiam ni ekvidis malklare la konturojn de bluetaj rokoj de la Ursaj insuloj, ekgalopis la lacaj kaj malsataj boacoj ankoraŭ pli rapide kaj en lasta fortostreĉo ili atingis la bordon, kie etendiĝis vasta tundro. — Kiam la glitveturilo haltis kaj la boacoj trankvile komencis paŝti sin, mi konfesis, ke mi ĉirkaŭbrakis dankeme iliajn kolojn kaj laŭte dankis al la ĉielo por mia feliĉo. Mi sentis ja dum la tuta vojo angoron, kiam iu el la boacoj

falos kaj ne volos pluen! Tio estus estinta mia pereco, malgaja morto kaj, kio ankoraŭ pli, ĝuste ĉi tie, kie estis finiĝonta mia vojaĝo tra la kontinento kaj komenonta la plua vojaĝo al nekonataj glaciaj dezertoj en la direkto al mistera loko, kiun oni nomas Norda poluso.

Dr. Ĉestmír Parma:

EVOLUO DE LA ESPERANTA KAJ LA NOVĈEĤA LITERATUROJ.

(Fino.)

Kia estis plua evolustacio de ĉeĥa literaturo? Dum la diligenta pionira verkado (ĉirkaŭ 30 jaroj post apero de gramatiko de Dobrovský) aperis grava verko: vortarego de Jungmann „Slovník českonešecký“. (1835-9) Li eldonis ĝin en siaj lastaj vivojaroj. „Slovník“ fariĝis bazo de la ĉeĥa literaturo por sekvantaj generacioj, kiuj serĉis en ĝi helpon de lingvaj malfacilaĵoj. Ĝi estis lingva enciklopedio, kiu fiksas la tiaman staton de la ĉeĥa lingvo, sed fiksas ĝin nur por ebligi ĝian pluan evoluon. En esperanta literaturo samspecaĵon ni havas en Vortaro de Wüster. Laŭ signifo ambaŭ vortaroj ne estas nur vortaroj, sed lingvaj enciklopedioj. Pri vortaro de Jungmann estas konate, ke ĉiuj verkistoj post Jungmann kaj liaj pli junaj samtempuloj kiel Kollár kaj Šafařík uzadis ĝin abunde. Krásnohorská ne kapablis fari sen ĝi sian faman tradukon de Byron. Ni volas nun kompreni laboron de Wüster. Ĝi estas dumviva laboro de unuaranga valoro kaj graveco, kiu certe influos esperantan literaturon kaj lingvan evoluon.

Post Jungmann oni prilaboris literaturon estante ĉiam sub pezo de unuopa vorto. Ĉiu vorto devis esti pripensata. Oni rigardis reen, al Jungmann. La lingvo ne havis ankoraŭ facilajn flugilojn — ĝis venis nova talento: Vrchlický (1853—1912).

Vrchlický ne plu pene cizelis vortojn kaj frazojn, li ilin facilmane elsorĉis.

Li faris el lingva materialo plej delikatan kaj brilantan esprimilon. Oni komparu ekzemple iun poemon de Jablonský kun iu ajn poemon de Vrchlický, oni ekmirigos. Per Vrchlický la ĉeĥa literaturo atingis staton, kiun ĝi nun posedas, staton, kiu estas egalranga al statoj de la plej kulturaj lingvoj. En Vrchlický ni lernas ŝati talenton, kiu faras saltegon antaŭen kaj puŝas la literaturon subite al la vera nivelo de la plej juna tago.

Cu esperanta literaturo havas sian Vrchlický? Tiam talenton en unu persono ĝi ne havas, eble ke la eksteraj cirkonstancoj ankoraŭ ne estas sufiĉe oportunaj por estiĝi tiam talenton: lia ega produktemo postulus grandan aron da legantoj, por ke eldonisto estu trovata. Esperantaj legemuloj ne estas sufiĉe nombraj, jen la unua baro kontraŭ estiĝo de esperanta Vrchlický. Sed nature kion ne eblas fari unu persono, tion eblas fari pliaj personoj: kaj vere en hungaraj verkistoj Baghy kaj Kalocsay ni havas verajn talentojn. Ni volas kompreni ilian signifon por esperanta literaturo kaj subteni ilin per nia legemo kaj per nia aĉetemo de esperantaj verkoj.

Literaturo havas du flankojn. Ĝis nun ni preparolis ĝian forman flankon. Sed ĉiu literaturaĵo havas sian enhavon, kiu estas same grava kiel la formo. Naciaj literaturoj kreas ne nur lingvajjn beloĵojn, sed ankaŭ kulturajn valorojn kaj finfine ili priskribas sencon de la nacia vivo. Ekzistas verkistoj, kiuj okupas sin precipe pri la vivosenco de ilia nacio kaj klopodas ĝin precizigi. En ĉeĥa literaturo tia verkisto estis Šafařík (1795-1861), kiu el slava pasinteco kaj el ekono de vasta slava teritorio ĉerpis forton por neĝojiga tiama stato nacia. Kollár (1793-1852) donis tiam necesan romantismom bazitan pense sur la samaj ideoj pri slava pasinteco kaj vasteco. Kiam la estanteco ne donas alian kialon por vivi ol la volon mem, tiam oni serĉas en la pasinteco, en historio la veran kialon kaj konstruas tiel nomatan „ĉelon“. Tiu agado, kiu sen certa romantismo ne estas ebla, trovis en Palacký sian talentan verkiston. Palacký (1798-1876) en sia konata „Hi-

storio“ konstruis evolulinion de la ĉeĥa historio kaj plilaŭtigis ĝin per ekzemplo de Hus. Romantismo almenaŭ flaviĝis, pensaro fariĝis pli realisma (verko de Havlíček) kaj fine pli homara (verko de Masaryk). Do tia estis la vojo de la ĉeĥa nacia idearo: el historio al aktuala, el romantismo al realo, el regioneco al mondeco.

En esperanta literaturo la periodo de orientiĝo sur la Terglobo ne montriĝis okulfrape. La studoj pri la ideo de la internacia lingvo estas skribitaj ne en esperanto, kio ja estas komprenebla. La tuta demando de internacia lingvo estis por ni per esperanto solvita kaj ĉesis inciti nian sciemon. La troajn esperojn, romantismom de unuaj tempoj ni trovas en esperanta literaturo ĉefe en brilaj kongresaj paroladoj de Zamenhof kaj en lirikaj poemoj de Zamenhof. Tiurilate oni povas kompari Zamenhof al Kollár. Sed fine la malklaraj prisencaj ideoj devis esti formulitaj, la tempa spirito iĝis ĉiam pli realeca. La „Interna ideo“ kristaliĝas, ni komencas ĝin prilabori. Unue historie, kiel Palacký historie prilaboris la ĉeĥan nacion ideon. Ekzistas jam verko de Haefker. Ĝi estas skribita, kiel Palacký skribis sian verkon: el bezonoj de la estanteco, serĉante en historio faritaĵojn por siaj veroj. Ni trovas en la verko de Haefker, Jarmiloj pasas, tion, kio povas al ni montri la vojon de la homara agado: historion de rasoj kaj popoloj, evoluon de opaj kulturoj, evoluon de ĉiuj kulturoj celantaj la tutmondan pacon. Tio estas esperantista kaj poresperantista historio de Haefker.

Rilate al la esperanta literaturo, ni troviĝas en la tagoj de Palacký kaj mankas al ni multo: evoluo al aktuala, al homara kunlaborado. Ni vivas ankoraŭ tro romantike. Nia idearo kristaliĝas ĉiujare, ĝi estas tro ampleksa por esti libre kaptata per unu sola persono, sed ĝia plej grava flanko — la sociologia — ankoraŭ mankas sian Masaryk, kiu montrus al ni klare la novan kulturon, kies idiomo estus esperanto.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.

NUMERO 36. - APRILO 1931.

LA GENERALA KUNVENO

de la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista okazis la 19-an de aprilo 1931 en kafejo Urban, Praha II., Václavské náměstí 33.

Ĉeestis 26 membroj, skribe reprezentitaj 49 m., sume 75 membroj. Gaste partoprenis 11 p. inter ili reprezentantoj de la Laborista ligo esperantista.

Malfermo: 9.45 horo.

Estas legataj saluta telegramo de ICK en Genève kaj salutaj leteroj de F-ino Šupichová Praha, Kudela Olomouc, Jukl Bratislava, Friedrich Košice, Dr. Parma Praha, Veselý Tábor, Slaný Vítkovice. S-ro Šustr transdonas saluton de „Heroldo de Esperanto“.

1. **Protokolo pri la pasinta Ĝenerala kunveno.** La kunveno konsentas ne legi ĝin, ĉar ĝi estis represita en La Progreso.

2. **Raporto de la komitato pri 1930.** Ĉar ankaŭ ĝian represon ricevis ĉiuj membroj en La Progreso (p. 29—33), la kunveno rezignas pri ĝia lego. Oni diskutas ĝiajn partojn:

a) **Varbado.** La debaton iniciatas s-ro Hromada, diziranta aŭdi pri spertoj dum la varbado. Akcentata estas neceso, ke la kursgvidantoj sendu tuj post enskribo de la kursanoj iliajn adresojn al ĈAE, kiu zorgos, ke estu konservata de la kursanoj intereso pri la movado. En tiu senco parolas gesroj Pytloun Bakov, dro Pitlík. Aldonas siajn rimarkojn gesroj Fryml Praha (ni havas tre multe da esperantistoj kompare kun aliaj landoj, tro multajn UEA-anojn), Vlčková Dubí (klubo pagu ĈAE-kotizon por siaj membroj), Votrubec Praha (la kotizo estu pagata monate), Ginz (kursestroj transdonu al ĈAE la zorgon pri la kursanoj, kluboj destinu la kotizon de siaj membroj tiel ke el ĝi 16 Kč povu esti pagata al ĈAE), Zemek Rumburk (malfacilaĵoj pro translokiĝo de ŝtataj oficejoj), Mothejzík Falknov (sama te-

mo, ne konsentas tute kun s-ro Z.). Post aldonaj vortoj de gesroj Herzigová, Fr. Staněk kaj Sklenčka laŭ propono de s-ro dro Fousek Přelouč la diskuto estas fermata per la dezires-primio, ke ĉiu gvidanto de la kurso sendu kompletan liston de la kursanoj al ĈAE.

b) **Esperanto en lernejoj.** Dro Kamaryt donas klarigojn pri la nuna stato de tiu demando. Al la temo parolas gesroj dro Pitlík, (esp. instruistoj anoncu sin al esp. ekzamenoj), Pech Plzeň (esperanto en lernejoj grekaj), Fryml Praha (instruistaj kursoj por mezlernejaj eksstudentoj), Vlčková Dubí (sole ekzamenitaj instruistoj instruu), Macháň Moravská Ostrava (instruantoj sciu perfekte la ĉeĥan lingvon). S-ro Sklenčka kaj aliaj priparolas la neceson de severaj ekzamenoj. S-ro dro Kamaryt respondas diversajn demandojn pri tiu temo. Decido: La kunveno rekomendas, ke ĈAE petu la ekzamenantojn de esp-o atenti pri konvena severeco dum la ekzamenoj.

c) **Radio.** Sroj dro Kamaryt, Ginz, dro Pitlík, Hromada parolas pri tiu temo. S-ro Macháň Moravská Ostrava petas klarigojn pri esperantistaj radioamatoroj laborantaj pri mallongaj ondoj. Ilin donos la radio-sekcio de ĈAE. Pri ĝia funkcio estas atentigataj ĉiuj interesiĝantoj kun la peto, ke oni en propra intereso interkomunikigu kun ĝi, kiam estas preparata aŭ farata ia laboro rilatanta al radio. Ĝia tasko estas noti ĉiun fari-taĵon kaj subteni la laboron kun helpo de la internacia Esperanto Radio-Servo.

Je la fino s-ro Hromada petas atenti kelkajn detalojn el la debato: Nun la laboron de la komitato faras kelkaj personoj, ne plu unu sola. — La granda membronombro de UEA en ĈSR, laŭ vortoj de s-ro Sklenčka, estas ebligita per kunlaboro de 400 personoj tra la tuta lando. (Del. kaj VD.) — Pri

la ŝtate ekzamenitaj instruistoj de esp.: iuj el ili ne nur ne instruas, sed tute ne havas kontakton kun la movado. —

La publikigita raporto de la komitato estas aprobita.

3. **La Progreso.** Sro Hromada informas pri ĝia nuna stato. La kunveno kontentas pri la bona redakto kaj riĉa enhavo kaj akcentas pri nepra neceso de tiu revuo. Membroj kaj kluboj estas petataj, ke ili regule raportu al ĝi pri sia agado.

4. **Kasista kaj revizora raporto.** La kasisto sro Sklenĉka atentigas pri sia raporto represita en La Progreso. (p. 33.). Laŭ deziro de sro Hromada li donas kelkajn klarigojn pri debitoroj, al kio faras siajn rimarkojn sroj Hromada kaj Baroch. La revizoro sro Vostrubec anoncas, ke li reviziis la librojn, konstatis ĉion en ordo kaj proponas absolvon al la kasisto kun esprimo de danko por bona laboro. Akceptita.

5. **Elekttoj.** La prezidanto sciigas, ke laŭ rezulto de lotumado okazinta sub lia kontrolo eliras el la komitato ĝesinjoroj Brambora, dr. Fousek, Herzigová. Estas elektotaj 4 novaj komitatanoj. Ĉar el la membraro venis neniu propono pri kandidatoj, oni ĉiuvoĉe konsentas pri aklamacia elekto de kandidatoj proponataj de la estraro; estas jenaj ĝes-roj: Brambora, Herzigová, Stanĉek, Vondroušek. Ili estas elektitaj aklamacie ĉiuvoĉe. Inter vic-komitatanoj vakiĝis pro rezigno (Grauerová), elekto (Vondroušek) kaj lotumado (Zemek) 3 lokoj, por kiuj estas proponataj kaj ĉiuvoĉe elektataj ĝes-roj dr. Fousek, Vlĉková, Vostrubec. En kontrolan komisionon estis elektitaj ankaŭ ĉiuvoĉe sroj Bujarek, Ĉerný, Heikenwälder, dr. Koneĉný, Pytloun kiel membroj, kaj Hanzelka, Holancová, Střihavka, kiel vicmembroj. La nomaro de la komitato rezultinta el tiu ĉi elekto estas sur p. 47.

Liberaĵ proponoj.

6. **Fondi Studentan sektion ĉe la Asocio;** la proponon prezentis sro Sedláček Praha; por akcepto pledis dr. Pitlík, Hromada, dr. Fousek. Defa-

lojn de la aranĝo fiksis la komitato. Reprezentanto de la sekcio estos sen elekto komitatano (laŭ propono de dro Fousek). Kotizo de la anoj de la sekcio estos 6 Kĉ poĵare anstataŭ 16 Kĉ. Akceptita ĉiuvoĉe.

7. **Komisii komitaton por verki kaj deputacie prezenti al prezidio de la registaro rezolucion pri signifo de esp-o en eksterlanda politika propagando, en propagando turisma kaj komerca, por ekligo kaj konservado de kulturaj kontaktoj kun la fremdlando, uzo en poŝtaj presaĵoj, apliko en filantropiaj celoj.** Proponon en nomo de la komitato rekomendis dr. Pitlík. Akceptita ĉiuvoĉe.

8. **Akcepti rezolucion esprimanta dankon de la kunveno al samideanoj montrintaj dum tiu ĉi jaro novan aktivecon kaj konsilanta al kelkaj kunlaborantoj pli da propravola disciplino.** La intencon de la propono klarigis en nomo de la komitato dro Kamaryt. Sekvis vigla diskuto kiun partoprenis sroj Fousek, Sedláček, Ginz, Pytloun, Stanĉek, Hromada Kamaryt, Fousek, Šustr, Sklenĉka, Tarantíková, Stanĉek, Herzigová, Vlĉková, Hromada, Pech, Waldstein, Fousek. La diskuto finis per ĉiuvoĉa akcepto de jena rezolucio:

Generala kunveno aŭdinte diversajn raportojn kaj spertojn pri la loka agado poresperanta konstatakas kun ĝojo, ke en diversaj lokoj samideanoj vidigas novan aktivecon. Ni dankas ilin tre sincere pro tio, kaj petas ilin persisti en la komencita laborado. Aŭdinte pri la spertoj pri ciklostilitaj bultenoj, kiujn eldonas kelkaj grupoj por celoj ne sole lokaj, ni konsilas amike al la oferemaj samideanoj ne komenci kaj ne daŭrigi plu tian eldonadon, kiu certe kostas al ili multajn oferojn. Sed tiuj oferoj kaj klopodoj ne alportas al la movado tiom da profito, kiom ili alportus, se ni ĉiuj plene respektus organizajn liniojn de niaj organizoj ĝenerale rekomendatajn.

9. **Sendadi regule Progreson al redakcioj de gazetoj, kie ĝia**

cito estas por ni speciale grava. Proponis f-ino J. Šupichová. Akceptita ĉiuvoĉe. La nomaron faros la komitato laŭ informoj promesitaj de la proponintino.

10. Eldoni lernolibron pri teorio kaj praktiko de nia movado por kandidatoj de la instruista ekzameno. Proponis s-ro Pytloun. Akceptita ĉiuvoĉe.

11. Rekomendi al ĉiuj ĉsl. esp-istoj, precipe al la aktivaj, atentan legadon de nia organo „Progreso“, kaj utiligi diligente la organizajn kaj propagandajn informojn en ĝi publikigitajn. Proponis dr. Kamaryt. Oni konstatis, ke tio sekvas el multaj hodiaŭaj debatoj kaj ĉiuvoĉe rekomendis tiun ĉi konsilon.

12. Zorgi, ke adresoj de interesuloj kunvenintaj pro rubriko en „Slovíčko“ kaj en aliaj gazetoj ne perdiĝu, sed estu laŭplane prilaborataj. Proponis f-ino Vlčková. Ĉiuvoĉe rekomendita.

13. Atenti ĉu instruantoj de esp-o en publikaj lernejoj estas ekzamenitaj kaj insisti, ke la ekzamenitaj instruistoj instruu. Proponis f-ino Vlčková Rekomendita al komitato.

14. Kun s-ro Scherer sendi tradukonton. Proponis s-ro Pytloun. Post informoj de s-ro Ginz kaj dr. Pitlík rekomendite aranĝi la aferon laŭ bezonoj de la koncerna loko.

15. Esperanto-Tago en Pardubice. S-ro Lavička rekomendas klopodon por grandnombra vizito. Oni konsentas kaj esprimas ĝenerale fidon pri bona sukceso.

16. Neprokrasti plu eldonon de la gvidlibro pri Praha. Proponis s-ro Šustr. Ĉiuvoĉe rekomendita al la komitato.

Fino de la kunveno je la 13.45 horo kun danko de la prezidanto al la ĉe-estantaj pro ilia vigla kaj atenta partopreno en la agado.

Dr. Stan. Kamaryt.

O. Ginz.

GVIDANTARO

de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista
por 1931.

Komitato.

Membroj:

Lad. Brambora, oficisto, Praha—Vinohrady, Čermákova 7.

Jos. Friedrich, fervoj-konsilanto, Košice, Jarná 13.

Otto Ginz, ofic., Praha II., Stárkova 4.
Růž. Herzigová, ofic., Praha—Žižkov, Karlova 8.

Rud. Hromada, fakestro, Praha VII., Sochařská 333.

Dr. St. Kamaryt, profesoro, Bratislava, Telocvičná 3.

Dr. A. Pitlík, ĉefsekretario de la komin. Praha II., Křemencová 17.

Otto Sklenčka, librotenisto, Hradec Král., Husovo nám. 628.

Frant. Staněk, stud., Praha VII., Veletržní 49.

Jar. Šustr, komercisto, Praha I., Dlouhá tř. 53.

Anna Tarantíková, ofic., Praha—Žižkov, Karlova 8.

Jos. Vondroušek, banka ofic., Brno, Falkensteinerova 9.

Reprezentanto de la Studenta sekcio:

Vlastimil Sedláček, stud., Praha—Dejvice 550, Masarykova Kolej

Vicmembroj:

Dr. Jos. Fousek, advokato, Přelouč.
Jos. Janda, Praha, Jindřišská.

Kudela A., Olomouc, Hor. Novosadská 56.

Fr. Slavík, Praha XIX., Uralské 447.
Bož. Vlčková, ofic., Kladno, Poldina huť.

Ferd. Votrubec, pošta ĉefsekretario, Praha VII., Schnellova 21.

Kontrola komisiono:

Membroj:

V. Bujarek, Nové Zámky, Hlavná pošta.

Vilém Černý, bankofic., Hradec Král.
F. Heikenwälder, ofic., Prostějov.

JUDr. Ad. Konečný, advokato, Jaroměř.

Fr. Pytloun, fervojisto, Bakov

Vicmembroj:

F. Hanzelka, oficisto, Lazy 6
 A. Holancová, lerneja direktorino,
 Vyškov.
 V. Štřihavka, oficisto, Kladno, dŭl
 Kŭbeck.

L KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis jaude la 23. Aprilo 1931 en Praha, kafejo Union. Ĉeestis S-roj Brambora, Ginz, Hromada, Sedláček, Staněk, Šustr, F-ino Tarantíková; S-ro Slavík kaj Votrubec. Senkulpiĝis sin S-ino Herzigová kaj Dro Pitlík. Leterojn al la kunveno sendis D-ro Kamaryt, S-ro Sklenčka kaj F-ino Vlčková.

Malfermo 20.45. — Fino 23.30. — Prezidas Hromada, protokolas Tarantíková.

El la programo ni publikigas la jenajn punktojn:

Funkcioj.

Longa debato pri divido de la laborfunkcioj estis fine prokrastita por la venonta kunveno, kiam ĉeestos ankaŭ la vicprezidanto.

Esperanto-Taĝo en Pardubice.

Ni denove faras alvokon al la samideanoj, kiuj venos la 27.-28. Junio al Pardubice, ke ili jam nun informu pri tio Esperantistan Klubon en Pardubice, kie ili ricevos pluajn informojn. Legu ankaŭ pri rabatoj sur p. 34. Tuj kiam ni ricevos de E. Kl. konfirmon, ke la klubo faros la instalon de la materialo kaj de tempo al tempo inspektos la standon, ni provos, ĉu estos eble ankoraŭ nun ricevi senpagan lokon por esp. stando, kiun oni promesis al ni.

Ekspozicio Louny.

Decidite trakti kun la Ekspozicia estraro, prunti esp. materialon, dediĉi propaĝandilojn kaj pagi ĝis ĉi tiu sumo la elspezojn, kondiĉe ke E. Klubo Klauo faros la aranĝojn surloke. La komitato salutis, se almenaŭ dum ĉefaj taĝoj ekspoziciaj povus tie ĉeesti membroj de la proksimaj kluboj por doni informojn al interesigantoj.

Fondaĵoj por ekzamenoj.

Laŭ la petskribo de S-ro Vítěk el Tisovce, kiu faris sukcesan ekzamenon pri esperanto en Bratislava, decidite subvencii lin per Kĉ 150.- por kompensi almenaŭ parte la fervojkostojn. Laŭ la deziro de la ĝenerala kunveno ni denove atentigas instruistojn samideanojn, ke ili faru la ŝtatajn ekzamenojn pri esperanto.

Studenta Sekcio.

Studentoj! Aliĝu! Sendu adresojn de viaj kolegoj!

Interkonsentitaj la detaloj administraj. Ni liveros al S-ro Sedláček, estro de la Sekcio, adresojn de studentoj jam aliĝintaj al Asocio. La kluboj estas per tio ĉi petataj sendi al ni por dispono de la Sekcio adresojn de ĉiuj studentoj esp-istoj en sia loko. La Progreso donos liston el siaj adresoj. La Sekcio uzos la oficialan paperon de Asocio, ŝtampilon, kun aldono: Studenta Sekcio. Laŭ deziro de S-ro Sedláček la korespondadoj por la Sekcio estu sendataj laŭ la adreso de Asocio (Praha VII., Sochařská, 333). Unu kopio de la forsendataj korespondadoj Sekciaj iras al la Sekretariejo de ĈAE, por informe. Studentoj pagantaj senpere al la Asocia kasisto la kotizon 6 Kĉ, notu sur la pagilo: Studenta Sekcio. La membroj de la Sekcio pagintaj por 1931 ricevos senpage du broŝurojn: „Svaz národů o esperantu“ kaj Collinson: „Esperanto a jeho kritikové“. La membroj de la SS estas plenrajtaj membroj de Asocio, kiel ĉiuj aliaj. Ili grupiĝas en SS unuigante sin por pli intensa propaĝando de esp-o inter la studentaro. La komitato esprimas la konvinkon, ke la Sekcianoj post fino de la studoj fariĝos ĈAE-membroj plenkotizaj. Informoj pri la SS estos presataj en La Progreso. (Bul-teno).

Pastro Zelezný

estas eble sola persono en ĈSR, kiu propaĝandas la t. n. „Esperantido“ aŭ „lingvo Esperanta“, kiu estas esp-o iom ŝanĝita (eĉ kelkfoje jam) de S-ro Saussure. La propaĝandaj metodoj de pastro Zelezný estas tiaj, ke jam kelkaj el liaj varbitoj konfesis al ni, ke ili lernis lian lingvon en falsa opinio lerni Zamenhofan esperanton. La neseriozeco de la propaĝando por tiu ĉi senŝanca projekto estas videbla el tio, ke la lernantoj post kelkaj lecionoj ricevas „atestojn“. Okazis ke laŭ adresoj en la esp-a rubriko de F-ino Šupichová S-ro Ž. „varbis“ adeptojn, kiuj urĝigis la atestojn ĉe — F-ino Šupichová. S-ro Zelezný agos tre honeste, se li al siaj varbitoj pli klare diros, ke tio, kion li proponas al ili, ne estas Esperanto — lingvo de Zamenhof, la plej disvastigita kaj vere praktikata lingvo internacia.

Multoblīga aparato.

D-ro Pitlík, kiu siatempe pruntis al Asocio rotacian multobligan aparaton de Instituto, deziris la 13. 4., ke ni resendu ĝin. Tion ni faris tuj la sekvintan tagon. Ĉar Asocio por siaj

laboroj nepre bezonas tian aparaton kaj devos ĝin do aĉeti, la kunveno komisiis S-rojn Ginz kaj Slavík informiĝi pri la prezo kaj kvalito de tiaj aparatoj.

Dana filmo, financa rezulto.

Neta profito rezultanta por nia Asocio estas ĉ. 2.600 Kč. La kasisto ricevis detalan financon raporton. La kunveno kun ĝojo konstatas sukceson de la lerta organizo kaj kunlaboro kaj dankas al S-ro Ginz kaj ĉiuj membroj kunlaborintaj. — S-ro Pujalo el Zagreb petis nin informi lin pri ĉio necesa por uzi la filmon en Jugoslavio. Ni plenumis.

Illumina kongreso.

S-ro Ing. Novák en Plzeň skribis laŭ nia peto al asocio Elektrotechnický svaz ĉeskoslovenský pri la propono de la japana delegacio al Internacia Illumina Kongreso allasi esp-on kiel unu el la lingvoj kongresaj. En sia respondo la elektroteknikista asocio E. S. Ĉ. konsentas pri la propono japana kun la rimarko, ke ili mem konstatis lingvaj malfacilaĵojn precipe pro tio, ke neniuj lingvoj slava estas allasita kiel kongreslingvo. Laŭ ilia opinio certe estus tre utile speciale por malgrandaj nacioj uzi lingvon internacian, precipe por debati dum la teknikaj kunsidoj. Por la venonta kongreso oni povus uzi esperanton; tamen ili ne povas diri, ĉu estus dezirinde aldoni ankoraŭ unu pluan oficialan lingvon al la nunaj (angla, franca, germana).

Diversaj.

Al Laborista Unuiĝo en Praha ni laŭ ilia peto pruntos materialon por propaganda elmontra murkestoj. — Du paroladojn de S-ro Scherer intencas aranĝi la regiona ligo silezia. — Al la centra organizo de gimnastoj Sokol ni proponos uzon de esperanto por celoj informaj kaj reklamaj.

CVIČTE SE ŽÁKY KURSU „SLOVÍČKA“!

Slovíčko ze dne 14. 4. oznamuje dětem z Kladna a okolí, že známá esp. pracovnice sl. B. Vlčková, úřednice na Kladně, Poldina huť, jest ochotna cvičiti s nimi lekce ze Slovíčka vždy v neděli. Děti jsou vyzvány, aby použily této příležitosti.

Esperantistě, zvláště z větších míst, přihlaste se též k podobné službě u sl. Šupichové, Praha II., Malá Štěpánská 6.

ĈSL. TISK A ESPERANTO.

Moravsko-slezský deník, Mor. Ostrava, uveřejňuje dne 10. 4. 31 delší článek o chystané antologii z čs. literatury. Mezi jiným píše: „Je pěkné, že literární odbor Svazu esp. upozorňuje na svůj plán předem a včas, a je ještě krásnější, že se neuzavírá návrhům a radám, ba že je sám vyvolává.“

Podkarkonošské Rozhledy, Náchod, zavedly esp. hlídku, kterou řídí p. Dr. Andryš. V čís. z 2. 4. jsou bohužel uveřejněny aprílové zprávy z Ligilo Prostějov bez jakéhokoli označení. V rubrice z 9. 4. jsou pak tyto aprílové zprávy otištěny vedle seriosních zpráv svazových(!).

Mladý svět, Praha, z 10. 2. 31 uveřejňuje výsledek I. esperantské soutěže. Esperantský překlad zaslalo 36 hochů a 25 dívek a 3 paní učitelky. Žáci a žákyně byli z Čech (33), ze země Moravsko-slezské (22), ze Slovenska (4), a z Podkarpatské Rusi (2). Rozdělení účastníků podle škol: obecná 22, měšťanská 21, reálné gymnasium 10, učitelský ústav 2, absolventka IV. ročníku 1, žákyně těsnopisného ústavu 1; dále 1 zámečnický učeďník. 3 žáci, kteří nenapsali jména školy, ač to bylo podmínkou soutěže, nebyli do soutěže pojata. K vylosování bylo určeno jen 55 žáků, protože 3 napsali úkol naprosto nečitelně a nesrozumitelně. 10 žákům (místo slíbeným 5) byla zaslána odměna. Kurs vede sl. Šupichová.

Národní Politika, Praha, publikigas en sia nro de la 24. 1. 31 ĉeĥan tradukon de la artikolo Protekto de la naturo en Nederlando, aperintan en Esperanto de UEA. Tradukis Jul. Šupichová.

Nový směr, Moravská Ostrava, v několika číslech (24. 12. 30, 10. 1., 17. 1. a 31. 1., 31) uveřejňuje esperantem vypravování J. A. F. Vítka: Mia vojaĝo en Svedlandon kaj Danlandon.

Zájmy ĉsl. pošt. a telegraf. zřizenečtva, Praha, pokračuje v písemném kursu esperanta p. Votrubce.

List paní a dívek, Praha, předkládá dne 2. II. svým čtenářkám tuto starobylou vtípnou anekdotu, která proběhla snad už všemi snaživými časopisy světa: Fred listuje v časopise. Najednou se ptá: Tatí, co je to esperanto? — To je světová dorozumivací řeč, hochu, vysvětluje tatínek. — A kde se vlastně mluví esperantem? — ptá se zvědavý Fred. — Nikde, praví otec.

Přihlásil jste se do Svazu?

MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Ŝtataj ekzamenoj. Ĉe la ĉeĥoslovaka ekzamena komisiono por popolaj kaj burĝaj lernejoj en Bratislava faris 15. IV. 1931 specialan ekzamenon el esperanto kun laŭdinda sukceso s-ro Jozef Vitek, instruisto en Tisovec. Antaŭ la ekzamena komisiono por elementaj kaj burĝaj lernejoj en Praha faris la 24. de aprilo 1931 sukcesan ekzamenon: 1.) Alois Holický, instruisto en Mirovice kaj 2.) Ludvik Jakoubě, maŝinseruristo el Hor. Hamry.

Esperanta sekcio ĉe Centra societo de ĉsl. profesoroj havis ĝeneralan kunvenon 2. V. 1931 en Bratislava dum prezido de dr. Kamaryt anstataŭanta direktoron R. Fridrich. Oni pri-traktis a ferajn organizajn kaj planon de plua agado. Inter aliaj aferoj oni interkonsentis: Akcepti rezignon de ĝisnuna prezidanto de la Sekcio, direktoro R. Fridrich kaj danki lin pro lia multjara prezidado. Turni sin al ĉiuj membroj de la Sekcio kun peto, ke ili pli intense klopodu por instrui esp-on en mezaj kaj fakaj lernejoj en kadro de la validantaj permesoj. Fari statistikon pri instruado de esp-o en la lastaj jaroj (depost la dato prilaborita en la pedagogia revuo *Střední škola* j. IV. p. 141. kaj j. VI. p. 242). Turni sin al la lerneja ministerio kun nova peto, ke ĝi pri-traktu la proponojn de la direktoroj pri nedeviga instruado de esp-o bonvole koncerne al formalaj ecoj de la aktoj. Turni sin al unu ĉefa oficisto de la lerneja ministerio kun peto por informi nin pri liaj spertoj koncerne la malfavoran sintenadon al esp-o-instruado. — La kasa havaĵo estas 202.15 Kč. Membroj 41. Novaj funkcioj estis unuanime elektitaj: Vlad. Jukl, profesoro de la Komerca akademio en Bratislava, prezidanto, Dr. A. Šilha, profesoro de realgimnazio en Příbram, vicprezidanto, Vl. Havránek, profesoro de reallernejo en Prostějov, sekretario. Ĉiun korespondadon adresu al la sekretario. S. K.

Prostějov. Ĝenerala kunveno de la Klubo estis 4. II. 1931. Ĉestis 21 p. Estis elektitaj: prez. Fr. Heikenwälder, vicprez. Vlad. Havránek, sekretario St. Jeřábek, kasistino A. Jeřábková.

La ceteran materialon ni prokrastas por la maja numero. Red.

ZA PROFESOREM ZUBATÝM.

Prof. dr. Josef Zubatý, president České Akademie věd a umění, jazykozpytec světového jména, zemřel 21. března 1931.

Ze měl Zubatý znalosti o základech esperanta, jest snad samozřejmé u genia jeho druhu, ale jest to i vidno z jeho prací. Činival zmínku o zákonech platných v esperantu, jakožto o takových, nikdy jich neodsuzoval, ale podle mého vědomí není též dokladů, na základě kterých bychom mohli řaditi Zubatého mezi své přátele. Pochybují, že by byl odpůrcem.

Byl jsem vždy přesvědčen, že mohu nabýti mnohých užitečných vědomostí i pro svou esperantskou práci od velkého filologa Zubatého. Domnívám se, že jeho stanovisko o vývoji českého jazyka možno skoro zúplna aplikovati na esperanto.

Velká obec jeho obdivovatelů byli čtenáři Naší řeči. Když většinu jeho vynikajících spolupracovníků rychle jednoho za druhým zkosila smrt, zůstal v redakční radě posléze téměř sám. Naše řeč byla pro něho forem, na kterém se stýkal Zubatý s československým lidem. Při svém pátrání po původu některých rčení nebo výrazů obracel se Zubatý často na čtenáře roztroušené po všech krajích republiky s dotazy, zda by bylo možno dopátrati se v jejich místech rozluštění. Bystřé závěry, k nimž pak docházel, udivovaly jeho žáky.

Byv od počátku pozorným čtenářem Naší řeči, získával jsem po mnoho let poučení z tohoto cenného zdroje. Učinil-li jsem dotaz na redakci, dostával jsem podrobnou odpověď v době velmi krátké vždy přímo od profesora Zubatého, jenž byl tomu listu zřejmě více než jen vrchním redaktorem.

Bylo mně velkým potěšením, když se mi jednou naskytla příležitost posloužiti Zubatému. Šlo tehdy o původ slova „čokl“, což jest, jak známo, opovržlivé označení psíků, užíváné snad většinou v Praze. Zubatý uvádí též mínění zesnulého prof. Ertla, podle kterého výraz „čokl“ povstal snad z „Jock“, skotské to formy jména „Jack“, což by tedy prý znamenalo asi „Kubík“ (zdrobnělina jména Jakub). Ertla na to přivedl verš Karla Havlíčka, kde nazývá anglického buldoga „džokem“. Otázkou bylo tehdy pro Zubatého, zda se ve Skotsku užívá pro psy nebo zvláště pro buldogy toho jména.

Pro mne, jakožto člena společnosti Univerzala Esperanto-Asocio, nebylo ovšem věci nsnadnou opatřiti přímo u pramene odpověď na tu otázku. Dopsal jsem panu Davidu Ritschiemu

Tullovi, ĉestnema zastupci de tiu societato en Edinburĝo, a post kelkaj tagoj mi ricevis klarigon, ke „Jock“ estas ĝuste en Skotio uzata nomo de hundo. Hundoj ĝenerale, ne ĉiuj, sed kelkaj specoj de hundoj, estas nomataj „Jock“.

Donaĵo de prof. Zubatema tute informacii a neopomenita mi ĉi tute atentigita pri la maniero, kiel mi ricevis la informacii. Ne estis ĉi pro tio, ke mi ne povis kompreni la signifon de la vorto „Jock“, sed pro tio, ke mi ne komprenis la signifon de la vorto „Jock“ en la skota lingvo. „Jock“ (skota „Jock“) estas ĝuste la sama kiel „John“ (Jan) a signifas ĉi tute pli „Hondino“ a ne ĉi „Kubiko“.

O. GINZ.



LINGVA FAKO

PĜEKLAD 27. TEXTU.

PĜeklad 27. textu zaslali: sl. Feldmannov Zlat Moravce, p. Felt Zlat Moravce, Hladk Karvinn, Hurych Tel, Jakoub Velk Hamry, Jandk Uzhorod, Kubsek Ant. Plze, Litera Dub, Mertensov Doln Kounice, Pytloun Bakov, Reitmajer Koice, Rosypal Hj, Stihavka Kladno, Stepn Hostiva, Suh Neum, celkem 15 osob. — Z 8 nejlep pĜeklad vylosovali jsme pĜeklad p. Ant. Kubska z Plzn, ktermu jsme zaslali knin odměnu.

Dum serado(1) de polusaj trezoroj.

En junio 1929 forveturis(2) el Ĉeĥoslovakio al dezerta(3) insulo Nova Siberio en la norda Glacia Maro la estro(4) de Eskimoj Jan Welzl, la plej aventurista(5) Ĉeĥoslovakio, kiu — jam sesdektrijara — volas tie dairigi(6) sian kuriozan(7) vivon, kiun li komencis kiel 25-jara viro, pedirante(8) el Irkutsk tra Siberiaj dezertoj(9) ĝis la limo de la eterna glacio. Jan Welzl postlasis(10) al ni precizan kaj kontinuan(11) priskribon pri sia aventura(12) vivo kaj pri siaj sensaciaj travivaoj en du romanoj. La unua el ili „Tridek jaroj en la Ora Nordo“, aperinta en 1930 atingis nun, en mallonga tempo post la apero, la trian eldonon kaj aperos anka en kelkaj mondlingvoj, inter ili anka en esperanto. Similan intereson montras la eksterlando pri la alia libro de Jan Welzl „Dum serado de polusaj trezoroj“, aperinta nun kaj priskribanta kiel memstara verko, pluajn aventurajn nordo, lian avidan seradon de oro turojn de Welzl, liajn sukcesojn en la mal-kaj de bestaro(14) kaj la mirindan vivon de la plej norda komercisto, inter strangaj, preska

nekonataj ĝentoj. La amba verkoj apartenas al la plej atentindaj libroj, kiuj aperis lastatempe ne sole en la ĉeĥa literaturo, sed e en la literaturo tutmonda.

Poznmky a definice.

1. tz: „serante...“; „La postsignoj“ se sem nehod, jeliko „postsigno“ estas „signo postlasita de io pasinta a io okazinta“, na pĜ. tedy: postsigno de fingro, piedsigno. Slovo stopa mono tz pĜeloiti: poststrio (de elfluinta akvo), vojsulko (de veturilo), restaetoj (de sango), kvanteto (da arento en solvao).

2. tz: forvojais.

3. „dezerta“ = kie tute mankas vegetaoj kaj loantoj; tz „senhoma“ = neloata de homoj; zde nikoli „senviva“ = perdinta la vivon, na pĜ. „senviva korpo“.

4. „estro“ = iu kiu estas e supera kaj unua rango, kaj posedas efektivan ordonpovon (regnestro, urbestro); „efo“ = tiu kiu estas e supera kaj unua rango, precipe pro honoro, kaj havas ordonpovon a ne (efo de oficejo, efredaktoro).

5. „aventurema“ = kiu deziras kaj seras aventurojn; aventurulo = homo kiu spertis multajn aventurojn; „aventuristo“ = kiu havas nenian difinitan profesion kaj trovas vivmedojn nur en riskoplenaj, plej ofte nehonestaj artifikoj.

6. nikoli: „progresi“ = ĉiniti pokrokoj.

7. „kurioza = interese nekutima, na pĜ.: „kurioza besto“, „spektaklo“ (podivn), kolekti plej strangajn kuriozaojn.

8. tz: „per piedvojao“, „per pedirado“; nikoli „piedvojao“ = cesta ve smyslu pina.

9. tz: tundro = senarba mara siberia stepe, kie kreskas sole muskoj kaj likenoj (liejnky).

10. postlasi = lasi post si: postlasi signojn, sekvojn malfeliajn, postlasi infanon, heredaon; tiu vizito postlasis fortan impreson e la publiko; havigi = helpi al iu por ricevi a atingi ion, alporti, doni, liveri; havigi al infano belajn bildojn, havigi al iu situacion, konfidon, havigi al si monon, plezuron.

11. kontinua = kies eroj formas seninterrompan, senmankan vivon: kontinua pluvo, febro, bruoj; muro, linio.

12. tz: malkvieta, sangoplena; nikoli „emociona“ = dojmny (kortua).

13. nikoli „distanca“ = vzdlenostn.

14. tz: „orseradon, bestoasadon“, seradon de oro kaj asadon. Nikoli: orasado, orpelado. asi = persekuti bestojn por ilin kapti a mortigi: asi pedrikojn,

leonojn, Peli = irigi rapide antaŭen: peli brutojn sur herbejon (hnáti dobytek na pastvu). Eksciti al rapida kurado kaj foriro: peli knabojn el la ĝardeno, katido pelas musojn, forpeli la hundon. Intensiĝi iun senton ĝis ia punkto: peli ĝis ekstremo la malamon.

Na ŝadost z řad ŭčastníkŭ řečto překladv ĵsme ochotni opraviti a vratiti překladv tomu, kdo přiloži 3 korunovė známky na výlohy.

Definice jsou vzaty většinou ze slovníku Grosjean-Maupin: Plena Vortaro.

28. TEXT K PŘEKLADU.

Tentokrátė přinášíme ři citáty kratši a očėkáváme, že ještė větší počet řtenářŭ vyzkouši na nich svoji jazykovou znalost i stylovou obratnost. Překlady, které nás dojdou do 25. května, vezmeme v ŭvahu při losování o knižni odměnu za nejlepší překladv. Doporučujeme i klubŭm, aby svym řlenŭm uložily tyto citáty přeložiti. Veškerė poznámky k překladvu pak námi uveřejněnému rádi vyslechneme.

1. Jen řlověk, který opravdu věři v to neb ono, má silné nervy a nepadá do mřlob v nepříznivých okolnostech; neboji se přiznat, že je špatné počasí pro jeho věc, protože má teplo v sobě; zato řlověk slabě věřící nebo pochybujič potřebuje, aby od věči neutekl, příznivých vnějšich okolností, vytopeného pokoje ve světě, pohodlné cesty a řůžové vody na své naděje.

2. Malý národ může obstáti v soutěži národŭ velikých jenom tehdy, když bude svoje vlastní výkony posuzovat velmi přísnými měřítky a bude-li k nim zaujímati stanovisko krajně kritické.

3. Jednou věči jsem si jist, že totiž mzdy nemohou býti podstatně sniženy, aniž by to vedlo ke katastrofě. Zisky, které tvoři kapitál, nepřicházejí pouze z hromadné výroby. Rovnoběžně s výrobou musí jíti spotřeba, a proto je nutno, aby zde byla mocná kupní síla, vytvořená liberálními mzdami. Každá radikální redukce této kupní schopnosti má v zápěti pokles ziskŭ. Podle tétož pravidla zisky lze stabilisovati placením stále lepšich mezd.

DIVERSA.

Domáci učení, učebné kursy vydávané Masarykovým lidovychovným ŭstavem, Praha, obsahují písemný kurs esperanta, který sepsal Josef Eiselt, ředitel gymnasia v. v. pod názvem „Esperanto pro každého“. Cena 5 sešitŭ (76 stran) 30 Kč. Doporučujeme.

Čsl. Antologio. Jam venis kelkaj leteroj tre interesaj. La personoj, kiuj ricevis la leteron de la Literatura Sekcio bv. ne forgesi pri-pensi ĝian enhavon kaj skribi al ni.

Konkurso literatura 1928. Tiu ři afero estas nun reprenata kaj ni esperas, ke aŭtune ni povos publikigi la rezultojn. Ni petas la partoprenintojn, ke ili afable paciencu ankoraŭ kelkan tempon.

Eubiotický restaurant Em. Voňky, Vinohrady, Mirové nám., 10. abonis la Progreson por siaj klientoj. Ankaŭ sur siaj leterpaperoj tiu ři veĝetarana restoracio presigis la devizon: Ni lernu esperanton!

Redakcia.

Ni petas atentí, ke ankaŭ tiu ři numero aperas ĝustatempe. Ĝia enhavo espereble ree kontentigos vin. La informoj venantaj kaj la kunlaboraĵoj al ni alsendataj estas nun tiom multaj, ke ni tre řatus eldonadi lopaĝajn numerojn. Sed tio dependas de la varba povo kaj emo de niaj amikoj. Jam nun ni ricevis el unu urbo 19 kaj el alia urbo 22 novajn abonantojn, ne kalkulante la lokojn kun pliaj 3—5 abonoj. Sed unuavice ni devas restarigi la antaŭan staton. En tiu rilato precipe la kluboj povus helpi al ni kaj ankaŭ al — si mem. Se la kluboj klopdos, ke iliaj membroj abonu la Progreson, ili ligos siajn membrojn pli potence al la movado, kio montriĝos certe en pli vigla kunlaborado kaj pli nombra vizitado de la kunvenoj.

Personoj, kiuj trovos en tiu ři nro admonilon kaj ne pagis ankoraŭ, estas ree petataj sendi la abonon almenaŭ nun. Ankaŭ tio plifaciligos la ekziston de la gazeto kaj ebligos frankvilan laboron de la redaktoro pri ĝia konstanta pliperfektigo.

Koran dankon al ĉiuj, kiuj montris al ni sian simpatian kaj donis sian valoran helpon!
R. H.

Slovník obchodně-technický, ŭčetní a daňový. Sešit řis. 28—31, jímž končí III. díl, obsahuje: Hotovost pokladni — Houby — Hrací karty — Hračky — Hromosvody — Hry — Hřebeny — Hudba — Hudební díla — Hudební nástroje, hudebniny — Hudebníci — Humanita — Hufnictví — Hypoteční ŭstavy — Hypoteka — Hypoteka lodní — Hypotekární pojištění — Hypotekární ŭpisy — Hypotekární zápŭjčky. Vydávají Tiskové podniky ŭ. S. Č. P., Praha I., Masarykovo nábreží 4. Cena sešitŭ Kč 26.—. Doporučujeme.

Novinová sazba povolena ředitelstvím pošt a telegrafŭ v Praze řis. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. - Presis JAN MINAR NYMBURK.